

Numero: 234.
Novembro: 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Nebulaj tagoj

Denove estas aŭtuno. La vesperoj kaj matenoj estas malvarmaj, eĉ frostaj. Sur la branĉoj de la arboj sidas nebulo, kvazaŭ kriante: „Nun jam mi estas Moŝto ĉi regione”

Forpasis la belaj, sunriĉaj tagoj. Mutiĝis la birdoj. La malfeliĉaj bestetoj tremante sidaĉas en siaj nestoj.

Tamen novembro, vi povas esti pitoreska. Viaj koloroj ĉarmigas min, se mi promenas en la aŭtuna arbaro, kaj rigardas la falantajn arbofoliojn.

Estas agrable sidadi en varma ĉambro, kie zumas amikeme kahelforno.

Komforta fotelo allogas min legi bonan libron. La legado flugigas min al nekonataj landoj kaj ĝi malfermas antaŭ mi pordegon, kiu kondukas al mirakla mondo.

Se jam miaj okuloj laciĝas pro la legado, mi malfermas ilin kaj sendorme mi sonĝas.

En mia sonĝo ekaperas bela mondo, kie ĉiu parolas Esperanton. La tiamaj homoj jam ne dubas je la zamenhofa lingvo. La jarcentoj pruvis, ke ĝi estas vivkapabla kaj povas helpi al la homoj, kiuj suferis pro la lingvaj miskomprenoj.

Ofte mi demandas de miaj homfratoj: „Kial vi estas kontraŭ Esperanto?” – Kompreneble mi ne ricevas respondon. La muroj estas mutaj. Tra la griza nubego mia voĉo ne povas trairi.

Ĉie kaj ĉie dikaj muroj, kiuj haltigas min. Mi volus liberiĝi de la indiferenteco, sed mi ne povas, ĉar la nubo estas sufokiga.

Sidi en la varma ĉambro estas agrable kaj dume forgesiĝi pri la problemoj de la mondo. Mi revadas en posttagmeza, aŭtuna animagordo.

Mi fermas miajn okulojn kaj mi sonĝas pri bela estonto, kiam nia lingvo Esperanto fariĝos ĉies komunikilo.

-Redaktanto-



Aŭtuno

Komuna lingvo

La bestoj decidis fari ian komunan, per kio ili povos kompreni sin, se ili renkontiĝas ie en la arbaro aŭ sur la kamparo.

Ĝis nun grava problemo estis la komunikado kaj pro la lingvaj miskomprenoj ofte okazis fatalaj tragedioj.

Por eviti tiun ĉi ĉiutagajn konfliktojn, nepre ili devas fari komunan lingvon.

La bestoj kunvenis sur arbara maldensejo, kaj komenciĝis la akra diskuto.

La urso ekstaris sur podion kaj ĝi komencis oratori:

--Estimataj ĉeestantoj, en la arbaro regas lingva ĥaoso. La leporeto ne komprenas la vulpon, la korvo la paruon. Ankaŭ nun multaj el vi ne konas miajn vortojn. Tio estas tre malbona. Ni devas eltrovi solvon, ke tiu ĉi problemo estu evitabla en la estonto. Kiom bone estus, se ĉiu besto komprenus unu la alian en la arbaro. Ĉesiĝus tuj la lingvaj miskomprenoj. Ni plu ne estus malamikoj. Mi esperas, vi komprenas kaj apogos min, por ke ni uzu komunan lingvon per kio ĉiu besto povos komuniki.

Granda demando, kies lingvo estu elektita por tiu ĉi grava celo. Tiu helplingvo devas esti sendependa kaj facile ellernebla por ĉiu.

Por ke mi helpu al vi elekti la komunikilon, mi proponas al vi elekti la mian. La ursolingvo estas vaste disvasiĝinta, belsona kaj mi garantias, vi facile povos ellerni ĝin.

Esperable vi ĉiuj unuanime akceptos mian proponon kaj post kelkaj sezonoj vi parolos urse. Tiam belega epoko sekvos en la arbaro. Vi komprenos ne nur min, sed ĉiun beston. Laŭ mi neniuj lingvoj povus plenumi tiun ĉi rolon. Do, mi rekomendas al vi, tuj komencu lerni la ursolingvon. Mi kaj miaj familianoj helpos al vi en la lernado. Ni donos al vi lernilojn senpage, eĉ la enimentuloj premie povos vojaĝi al la norda poluso por renkontiĝi kun nia granda frato, la blanka urso.

Neatendite kampara museto interrompis la oracion.

--Kio okazos al tiu, kiu ne deziras ellerni la ursolingvon?

La urso kolereme alrigardis la kamparan museton kaj murmuris:

--Vi estas tro malgranda. Vi ne rajtas kontraŭi mian proponon. Vi kaj aliaj malgrandaj bestoj devas akcepti la novan lingvon sen diskuto.

La bestoj mute aŭskultis la urson, kaj neniuj kuraĝis diskuti. El ili multaj konsentis, en la estonto la ursolingvo estu la unusola komunikilo. Kiu kontraŭis tion, tiun la timiga kaj forta urso punis.

-Ŝaŝa-

Mi ne povas vivi sen vi

Mia rakonto komenciĝis antaŭ multaj jaroj.

En iu mateno irante al la fabriko la laboristoj trovis kadavron apud la vojo en la pluvakvokavo.

Junulo kuŝis tie morte. Liaj okuloj estis fermitaj. Unue la homo pensintus, ke li nur dormas. Sed rigardante ĝin pli bone estis videbla, ke lia juna vivo jam delonge forlasis la korpon.

Tuj estis telefonita al polico kaj apenaŭ pasis kvin minutoj, ekaperis tri policanoj.

Ili forsendis la rigardaĉantojn, kaj disponis pri la kadavro.

Efektive neniu sciis, kio okazis. Oni komencis flustradi en la urbeto.



La junulon konis neniu. Onidire antaŭ nelonge li alvenis. Li loĝis en monata ĉambro, kaj tie li ekkonis la filinon de la dommastro.

Ili enamiĝis unu al la alia, sed la rigora patro ne volis tion. Post kelkaj semajnoj li forsendis sian loĝanton kaj li malpermesis, ke la gejunuloj renkontiĝu.

Pro tio la knabino ploris tage kaj nokte. Malgraŭ la malpermeso de sia patro ŝi sekrete renkontiĝis kun sia amanto.

Ili decidis, ke forlasos la urbon kaj ie fore ili komencos novan vivon.

--Ni estos feliĉaj – diris la junulo, kiam kaŝe ili renkontiĝis en malhela strato – KREDU MIN!

La knabino febre brakumis lin kaj ŝi tremis pro la timo. Ŝi timis, ĉar ekde la skandalo sia patro ĉien sekvis ŝin.

Ili apenaŭ trovis okazon por renkontiĝi. Ankaŭ tiam ŝi ĉiam timis, ĉar ŝi ne sciis, sia patro kiam ekaperas.

Ili disiĝis kun varmegaj kisoj kaj promesis unu al la alia, ke morgaŭ ili forlasos la gepatran domon.

La patro suspektis ion kaj luis detektivon, kiu sekvis la knabinon dum la tuta tago.

La detektivo notis ĉion kaj li tuj informis sian komisianton, kaj la patro havis sufiĉe da tempo por malhelpi ilian eskapon.

La knabino estis ŝlosita en la ĉambron, kaj ŝi ne povis iri al la difinita loko. La junulo longe atendis ŝin. Kiam jam pasis pli ol duonhoro, eĉ pli, li iĝis nervoza. Li tuj iris al la domo de la knabino, sed li ne povis paroli kun sia amatino. La rigora patro staris antaŭ li la vojon.

--Mia filino ne estas hejme – li mensogis kaj fermis la pordon.

--Tion mi ne kredas. Lasu, ke mi parolu kun ŝi! – li preskaŭ petegis – Mi scias ŝi estas ene. Nur unu vorton, ke mi parolu kun via filino.

La patro estis tre kolerema, kaj jam li furiozis aŭdante la parolon de la junulo.

--Friponulo, for de mia domo! – li muĝis – Ne atendu ĝis mi tute koleriĝos! Foriru!



Li restis ĉe la pordo kaj ne movis.

Ilian diskuton ekaŭdis la knabino en la ĉambro kaj ŝi komencis kriadi laŭte:

--Karulo, mi ne povas vivi sen vi. Mia paĉjo ŝlosis min en la ĉambron. Savu min, mi petegas, kara mia! Mi volas vivi kun vi.

La junulo volis enpenetri perforte, sed la viro ne lasis. Ŝajne li estis pli forta ol la junulo. Komenciĝis lukto inter ili.

Neniu vidis, kio okazis, ĉar estis malhelilo. Krome la pordon kovris arbustoj kaj arboj.

Dume la filino de la viro senĉese kriadis. La najbaroj ofte aŭdis similan, ĉar en la lastaj jaroj malboniĝis la rilato inter ili. Eble tial neniu interesis, kio okazas en la najbaro.

Subite mallonga veokrio estis aŭdebla kaj iĝis profunda silento. La junulo silentiĝis.

--Paĉjo, kio okazis? – demandis la knabino el la ĉambro, sed ŝia voĉo perfidis timegon – Paĉjoooo!

La viro ne respondis. Ŝi aŭdis strangajn bruojn kaj ŝi ne komprenis, kio okazas.

Post longaj minutoj la viro iris al la pordo, kie estis enfermita lia filino kaj li diris:

--Li foriris kaj li ne revenos.

Lia filino ne volis kredi tion. Ŝi histerie frapegadis sur la pordo. Ŝia patro malŝlosis ĝin kaj diris:

--Se vi ne kredas min, tiam konvinkiĝu pri ĝi propraokule!

La knabino elvenis, kaj efektive ŝi vidis nenie sian amaton.

--Kie li estas? – ŝi demandis akuzante sian patron – Kien li iris? Paĉjo mia, mi scias, ke li ne forlasis min. Ja, li amas min. Mi ne povas vivi sen li. Mi petegas, diru al mi, kie li estas?

La patro silente montris dorson al sia filino. Li nur ripetadis mallaŭte:

--Li foriris kaj plurfoje li ne revenos. Trankviliĝu kaj rezignu! Tia estas la vivo. Oni ofte trompiĝas.

La knabino amare esploris. El ŝiaj okuloj grandaj larmogutoj rulis tra ŝia pala vizaĝo, kaj ŝi nur plorante ripetadis:

--Mi ne povas vivi sen vi. Mi ne povas vivi sen vi.

La polico longe ekzamenis la strangan morton de la junulo, ĝis fadeneto kondukis al la viro, kaj la urbanoj eksciis, kio okazis efektive.

-Apati Kovács Béla-

Poezio

Lajos Tarkony

Balkona vespero

Lit-seĝo. Lankovriroj. Dua etaĝ'. Balkono.
Siajn vualojn densajn faligas jam vespero,
sonorilvoĉo velke traŝvebas en l' aero.
Torpor' postfebrea. Kape vaganta pensĉifono.

Sur transa bord' de l'golfo, en fee fora fono
ekbrilas lumserpento: vibranta koliero
sur kolo de l' mallumo, anoncas ĝi pri tero,
pri urbo kaj loĝantoj: pri homo kaj pri ŝtono.

Ho stranga pens': ĉi urbe, kies stratetojn
plande
ankoraŭ mi ne tuŝis kaj kien mia febre
sopira okulparo rigardas lace, lante,

ĉi urbe eble homo – same soleca, trista, –
algapas nun la maron, niaj rigardoj eble
sin krucas en saluto, ho ve senpove dista...



Sol John S. Dinwoodie

Soleco

Ŝafisto iras sur montaro,
kie birdkantoj sonas;
kun la Natur' en solidaro
solecon li ne konas.

Sed iras mi sur urbostratoj,
kie la bru' senĉesas;
kaj meze inter la homfratoj
fremdule mi solecas.



Poezio

Cezar

Chaplin en Parizo

Kara mimo en Parizo,
Chaplin sur la strato,
mi por vi poemon skribas
kiel via frato.

Mi de vi nenion scias,
eĉ ne aŭdas vorton,
sed amiko, mi admiras
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,
pantomima grando,
kun melono sur la kapo
belo de la lando.

Via mondolingvo muta,
via palpebrumo,
montras, ke la homo estas
pli ol nur kostumo.

Kiel vi la kisojn ĵetas
En pariza parko,
tio estas majstroverko
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo
el pli bona mondo,
mi vin dankas, kamarado,
tramp' kaj vagabondo.

Restu forta, mi deziras,
kontraŭ la enuo,
per silento el la koro,
meze de la bruo.



Por infanoj



La feino kaj avarulo

Ĉu estis, ĉu ne estis en Fabellando vivis avarulo. Dum la tuta tago li nur nombradis sian monon kaj li revadis, kiel akiri pli multe da trezoroj.

En la najbaro loĝis tre malriĉa homo kun sia edzino Ili estis tiom malriĉaj, ke ofte dum tagoj ili manĝis neniom.

En iu tago la malriĉulo laboris en la ĝardeno kaj trovis ormoneron. Ekvidante ĝin li tre ĝojegis, ĉar li povos aĉeti manĝaĵon.

Li kuris feliĉe al sia edzino, kaj jam kriegadis sur la korto:

--Edzino mia! Edzino mia, mi trovis ormoneron en la ĝardeno dum la fosado.

La kriegadon ekaŭdis la avarulo, kaj li tuj iris al la barilo. Li diris al la malriĉulo:



--Tiu ormonero estas la mia. Mi postulas, tuj redonu al mi!

--Sed sinjoro najbaro, ĝi estis trovita en mia ĝardeno. Do, la ormonero apertenas al mi. Mi ne donas ĝin.

--Se vi ne donas, mi iros al la juĝisto kiu devigos vin redoni, eĉ vi estos punata.

Tion ekaŭdante la malriĉulo malgajiĝis, ĉar la juĝisto estis la bofrato de la avarulo.

Kion fari? Kion fari? Li cerbumis dum la tuta tago en la ĝardeno sub la ĉerizarbo.

Kiel li sidis tie, subite antaŭ li ekaperis malgranda feino, kaj ŝi demandis:

--Malriĉulo, kial vi malĝojas?

--Ho, granda estas mia malĝojo – li komencis kaj detale li rakontis al la feino, kio okazis. Kiam li silentiĝis la feino laŭte ekridis je la surpizo de la viro.

--Ĉu jam ankaŭ vi priridas min feineto? – li demandis amare.

--Ne, mi ne priridis vin, eĉ mi deziras helpi al vi. Donu al mi tiun ormoneron! Ne timu, baldaŭ vi rericivos ĝin por ĉiam.

La malriĉa homo transdonis sian trezoron al la feino, kiu tuj iris al la avarulo.

--Kion vi volas? – li demandis mire.

--Mi alportis la ormoneron. Mi deziras donaci ĝin al vi.

Kiam la avarulo ekvidis la moneron, komencis saltadi pro la ĝojo.

--Vi estas bona feino. Ĉu ne? Kial ĉi ormonero al mia najbaro, se li estas malriĉa? Donu jam ĝin al mi por ke mi metu en la trezorojn, kie ĝin atendas ĝiaj fratetoj kaj fratinetoj.

Antaŭ ol transdoni la ormoneron la feino diris al la avarulo:

--Mi donacas al vi ĝin, sed vi devas obei al mi.

--Kio ĝi estu? Diru!

--Ĉi ormonerojn plantu en vian ĝardenon. Se vi sekvos miajn konsilojn, tiam post kelkaj semajnoj el ili elkreskos granda arbo, kaj sur ĝi estos miloble pli ormoneroj, ol vi havas.

--Ĉu vere? – ekscitiĝis la avarulo – Mi jam iras kun la flosilo al la ĝardeno, kaj mi plantos miajn ormonerojn.

Tiel okazis. La avarulo plantis ĉiom da ormoneroj. Ĉiutage li akvumis la teron, ke la arbo rapide elkresku.

Pasis la tagoj, eĉ semajnoj, sed la arbo ne elkreskis.

La avarulo nervoze demandis de la feino:

--Kial ankoraŭ ne elkreskis la arbo?

La feino nur ridetis:

--Eble la ormoneroj estas tro profunde. Mi proponas, iru al la ĝardeno kaj kontrolu kiom profunde ili estas.

La avarulo elfosis la ormonerojn kaj li ŝutis sur ilin teron, kiu apenaŭ kovris la trezoron.

--Tiel estos bone – diris la feino --Ekvidu, nun jam baldaŭ elkreskos la arbo. Atendu kelkajn semajnojn kaj vi estos pli riĉa.

Apenaŭ ŝi eldiris tion, super ili neatendite ekaperis birdoj, kiuj flugis sur la grundon, kaj tuj komencis pikplukadi la ormonerojn.

Vidante tion la avarulo, li laŭte ekkriis kaj turnis sin al la feino:

--La birdoj forportas mian havaĵon. Helpu feino! Kien ili portas miajn ormonerojn?

--Ne, amiko, la birdoj nur disdonadas viajn ormonerojn, kiujn vi forrabis de multaj malriĉuloj. Rigardu, ili enĵetas ĝin ĉiun ĝardenon, kaj kiel ĝojas la homoj vidante la brilantan monerojn.

La avarulo povis fari nenion kontraŭ la birdoj. Ili forportis ĉiom da ormoneroj, nur unu estis lasita sur la grundo.

Ankaŭ la malriĉa homo rericervis la sian, kaj li estis tre dankema al la feino. Lia najbaro plurfoje ne kuraĝis protesti, ĉar en la vilaĝo ĉiu priridis lin, kiel la feino superis lin.

-La onklo Adalberto-



Belaj bildoj

Belaj bildoj

